



**FLANDRA
ESPERANTISTO**
MONATA REVUO
ORGANO DE LA FLANDRA
ESPERANTO
MOVADO

ENHAVO :

Je nia apero. — Zamenhofaj Paroloj. — Diversaj Informoj. — Activisten, leert Esperanto ! Internaciaj semajnoj Esperantistaj. — Belga Ligo Esperantista kaj la Flandroj. — Leterkesto. — Vlamingen, leert Esperanto. — Inter ni. — La Flandra Popolo. — Diversaĵoj. — Bibliografio. — Subteno por nia revuo.

JARA ABONPREZO : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

FLANDRA ESPERANTISTO

Organo de la Flandra Esperanto - Movado

APERAS ĈIUMONATE.

Redaktoro kaj Administranto :

JAN VAN SCHOOR

Julius De Geyterstraat, 149/1, Antwerpen.



Jara abonprezo : 10 frankoj. — Eksterlando : 3 belgoj.

Poŝtĉeko : 1735.09

Je nia apero.

Jen „FLANDRA ESPERANTISTO”!

„FLANDRA ESPERANTISTO” volas esti la organo de ĉiuj Flandraj esperantistoj kaj instigi ilin al kunlaborado kaj organizado en propra „FLANDRA ESPERANTISTA FEDERACIO”.

„FLANDRA ESPERANTISTO” volas konigi al la eksterlandaj samideanoj la flandran celadon por propra kulturo kaj propra regado.

„FLANDRA ESPERANTISTO” enhavos ankaŭ rubrikon pri la luktado de aliaj subpremitaj popoloj, kiuj ne jam aŭ ne plu havas propran organon. Por tiu rubriko ni petas la kunlaboradon de anoj-esperantistoj de malgrandaj, subpremitaj popoloj.

„FLANDRA ESPERANTISTO” propagandos la lernadon de Esperanto en Flandrujo kaj zorgos por la neforgeso de la noblaj pensoj kaj paroloj de Zamenhof.

„FLANDRA ESPERANTISTO” estos ankaŭ kontraŭ-militema kaj batalos per ĉiuj siaj fortoj kontraŭ la plej hontiga plago de l'homaro: la milito!

„FLANDRA ESPERANTISTO” unuvorte ne nur volas esti la parolilo de la flandraj esperantistoj sed la parolilo de ĉiuj esperantistoj, kiuj simpatias kun la du fundamentaj ideoj, entenataj en nia devizo „*Libera Flandrujo en paca mondo*” : memstareco por la flandroj, por ĉiuj gentoj ; — paco inter ĉiuj popoloj !

Jen „FLANDRA ESPERANTISTO”!

Helpu, apogu ĝin per varbado de abonantoj, per varbado de anoncoj, per monaj donacoj, per taŭga kunlaborado !

VIVU FLANDRUJO !

VIVU ESPERANTO !

VIVU LA MONDPACO !

FLANDRA ESPERANTISTO.

ZAMENHOFAJ PAROLOJ.

Ĉe la malfermo de la Dua Kongreso Esperantista en Genève,
la 28an. de aŭgusto 1906, la Majstro i. a. diris jenon :

El la deklaro unuanime akceptita en la Boulogne'a kongreso, ni ĉiuj scias, kio estas la Esperantismo en rilato praktika ; el tiu ĉi deklaro ni ankaŭ scias, ke „Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu uzas la lingvon Esperanto tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas”. Esperantisto sekve estas ne sole tiu persono, kiu uzas Esperanton sole kaj ekskluzive por celoj praktikaj ; Esperantisto ankaŭ estas persono, kiu uzas Esperanton por gajni per ĝi monon ; Esperantisto estas persono, kiu uzas Esperanton nur por amuziĝadi ; Esperantisto fine estas eĉ tiu persono, kiu uzas Esperanton por celoj plej malnoblaj kaj malamaj. Sed krom la flanko praktika, deviga por ĉiuj kaj montrita en la deklaro, la Esperantismo havas ankoraŭ alian flankon, ne devigan, sed multe pli gravan, flankon idean. Tiun ĉi flankon diversaj Esperantistoj povas klarigi al si en la plej diversa maniero kaj en la plej diversaj gradoj. Tial, por eviti ĉiun malpacon, la Esperantistoj decidis, lasi al ĉiu plenan liberecon akcepti la internan ideon de la Esperantismo en tiu formo kaj grado, kiel li mem deziras, aŭ se li volas — eĉ tute ne akcepti por la Esperantismo ian ideon. Por demeti de unuj Esperantistoj ĉian respondecon por la agoj kaj idealoj de aliaj Esperantistoj, la Bulonja deklaro precizigis la oficialan, de ĉiuj sendispute akceptitan esencon de la Esperantismo kaj aldonis la sekvantajn vortojn : „Ĉiu alia espero aŭ revo, kiun tiu aŭ alia persono ligas kun la Esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la Esperantismo ne respondas”. Sed bedaŭrinde la vorton „privata” kelkaj amikoj-Esperantistoj klarigis al si en la senco de „malpermesata”, kaj tiamaniere, anstataŭ konservi por la interna ideo de la Esperantismo la eblon tute libere disvolviĝi, ili volis tiun ideon tute mortigi.

Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por nia utilo, tio ĉi kompreneble al neniu donas la rajton postuli, ke ni ĉiuj vidu en Esperanto nur aferon praktikan. Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la Esperantistoj aperis tiaj voĉoj, kiuj diras : „Esperanto estas nur lingvo ; evitu ligi eĉ tute private la Esperantismon kun ia ideo, ĉar alie oni pensos, ke ni ĉiuj havas tiun ideon, kaj ni malplaĉos al diversaj personoj, kiuj ne amas tiun ideon ! Ho kiaj vortoj ! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi Esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el nia koro tiun parton de la Esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por

Esperanto ! Ho, ne, ne, neniam ! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno : „Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan” ! Venos iam la tempo, kiam Esperanto, fariĝinta posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean ; tiam ĝi fariĝos jam nur lingvo, oni jam ne batalados por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton. Sed nun, kiam preskaŭ ĉiuj Esperantistoj estas ankoraŭ ne profitantoj sed nur batalantoj, ni ĉiuj konscias tre bone, ke al laborado por Esperanto instigas nin ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri la sankta, granda kaj grava ideo, kiun lingvo internacia en si enhavas. Tiu ĉi ideo — vi ĉiuj sentas ĝin tre bone — estas frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj.

Diversaj Informoj.

La broŝuro „La Flandra Movado klarigata al la partoprenantoj de la XXa Universala Kongreso de Esperanto”, kiun Flandrema Grupo Esperantista senpage disdonis al ĉiuj kongresanoj, ne plu estas havebla.

De diversaj flankoj oni ankoraŭ nun petas tiun broŝuron. La petintoj iom paciencu : baldaŭ nova broŝuro pri la „Flandra Movado” aperos !

* * *

Grandaj partoj el la broŝuro pri la Flandra Movado, eldonita de Flandrema Grupo Esperantista aperis en la bretona monata revuo „Gwalarn”.

Krom tio estis multaj diverslandaj samideanoj, kiuj gratulis la anojn de tiu grupo pro ilia iniciato kaj insistis, ke ili daŭrigu tiun movadon kaj persistu en ilia entrepreno.

Flandrema Grupo Esperantista estis laŭdata pro tiu broŝuro en diversaj esperantaj revuoj kaj per leteroj, precipe de Bretonoj, Alsacanoj, Katalunoj kaj anoj de aliaj subpremitaj popoloj.

* * *

En la vintra numero de Gwalarn aperis bretonlingva traduko de la broŝuro „La Flandra Movado”, eldonita de Flandrema Grupo Esperantista dum la XXa Universala Kongreso de Esperanto en Antverpeno.

ACTIVISTEN, LEERT ESPERANTO!

(Aktivistoj, lernu Esperanton!)

Sub tiu flandra titolo „L'Action Nationale” („La Nacionala Agado”), la semajna organo de la belgaj fasĉistoj, skribas en sia numero de la 11a. de majo:

„Et ceci nous donne une idée de plus de l'illogisme des activistes.

Dans le „Schelde” de mercredi dernier — car nous sommes obligés de lire le „Schelde”, hélas! — dans le „Schelde” donc nous lisons un article adressé aux Flamands, et leur recommandant d'apprendre... l'Esperanto! Nous apprenons en même temps que le „Flandrema Grupo Esperantista” a son siège au „Malpertuus”, local des activistes anversois. Mais la rage activiste contre la langue française est telle qu'ils voudraient la voir complètement extirpée des régions flamandes. — Ne leur écrivez pas en français, ils ne vous répondraient pas.

Le français rend service au Flamand qui l'apprend; à bas la langue française.

L'esperanto ne rend aucun service, c'est certain: apprenez l'esperanto!

Ces gens n'ont pas l'amour de la langue flamande — ce qui serait bien: ils n'ont que la haine de la langue française!”

Por la esperanto traduko:

„Kaj ĉi tio havigas al ni plian ideon pri la nelogikeco de la aktivistoj.

En la „Schelde” de pasinta merkredo — ĉar ni estas devigataj legi la „Schelde”, ho ve! — en la „Schelde” do ni legas artikoleon por la Flandroj, kaj konsilanta al ili lerni... Esperanton! Ni ekscias samtempe, ke la „Flandrema Grupo Esperantista” havas sian sidejon en „Malpertuus”, kunvenejo de la antverpenaj aktivistoj. Sed la aktivista rabio kontraŭ la franca lingvo estas tia, ke ili dezirus vidi ĝin tute forigita de el la flandraj regionoj. — Ne skribu al ili france, ili ne respondos al vi.

La franca utilas al la Flandro, kiu lernas ĝin: for la franca lingvo. Esperanto neniel utilas, estas certe: lernu esperanton!

Tiuj homoj ne amas la flandran lingvon — kio estus tre bona; ili nur malamas la francan!”

La leganto mem juĝu laŭ tiu specimeno pri la spirita stato, la mensa malsano de la belgaj fasĉistoj.

INTERNACIAJ SEMAJNOJ ESPERANTISTAJ.

En 1928, la Brita Esperantista Asocio, aranĝis tre sukcesplenan karavanon al la Kongreso en Antverpeno, kaj nun aranĝas karavanon al la 21a en Budapeŝto. Sed pro la longa distanco kaj alta kosto, kaj ankaŭ ĉar la dato ne taŭgos por ĉiu, multaj Esperantistoj el okcidenta Eŭropo ne povos partopreni tiun internacian feston.

Por ebligi, ke kelkaj el tiuj havu la Esperantan vivon kaj samtempe ĝuindan libertempon, la B. E. A. aranĝas du internaciajn semajnojn. En du lokoj ĝi luas hotelojn por po cent personoj, kun taŭgaj grandaj ĉambroj por kunvenoj, dancoj, k.t.p. El la cent, kvardek estos Britoj, kaj la aliaj estos alilandanoj diversnaciaj. Jen la detaloj.

Esperantista Libertempo I, en Oostduinkerke aan Zee, Belgujo, 13an-20an de Julio, 1929.

Oostduinkerke estas bela marbordloko, kaj la hotelo estas tre komforta, kaj tute apud la maro. Okazos kunvenoj, koncertoj, komuna kantado, dancado, k.t.p. kaj oni aranĝos vizitojn al Ieperen kaj Brugge. La kosto por persono estos po 25/-, 400 fr. belgaj, 280 fr. francaj, 45 m. germanaj, aŭ egalvaloro en alia mono. Tiu prezo enhavas la koston de loĝado, manĝado kaj amuzadoj, krom la eblaj vizitoj al Ieperen kaj Brugge.

Esperantista Libertempo II, en Rouen, Francujo, 27an de Julio-3an de Aŭgusto 1929.

La necesaj aranĝoj estas faritaj ĉe taŭga hotelo, kiu havas bonegajn ĉambrojn por kunvenoj, kaj bonan danchalon. Okazos kunvenoj, koncertoj, komuna kantado, dancado, k.t.p. kaj oni aranĝas vizitojn al interesaj fabrikejoj kaj tuttagan ekskurson sur la rivero. Se la partoprenantoj dezirus, oni ankaŭ aranĝos viziton al Parizo aparte pagota. 45/-, 400 fr. belgaj, 280 fr. francaj, 45 m. germanaj aŭ egalvaloro en alia mono.

TRE GRAVA.

Ĉar nur 60 alilandanoj povos partopreni ĉiun semajnon, la unuaj aliĝoj kompreneble estos la bonŝancaj. Tial, sendu la aliĝilon senprokraste, kun aŭ la tuta pago, aŭ partpago de minimume 20 ŝilingoj aŭ egalvaloro. Vi ricevos kvitancon, kaj pli poste detalan programon.

Kompreneble, alilandano faros sian propran aranĝon por atingi la libertempojn. (Oostduinkerke estas inter Oostende kaj Dunkerque, kaj atingebla de Oostende per tramo).

Por la Flandraj Esperantistoj.

Okaze de la supre anoncita Esperantista Libertempo en Oostduinkerke a/Zee, Flandrema Grupo Esperantista organizas la saman semajnon, do de la 13a ĝis la 20a de Julio, libertempan restadon en la sama loko. La Flandraj geesperantistoj, kiuj dezirus, kuniri skribu por detaloj al **Fino Martha Vervloet, Gravinstraat, 32, Borgerhout-Antwerpen.**

Tiuj, kiuj ŝatas tranokti en tendo povos fari tion. La posedantoj de tendoj, kiuj volas teni ilin je la dispo de la grupo, bonvolu sciigi tion! Materialo por la tendaro, se oni tion posedas, oni ankaŭ kunportu!

Belga Ligo Esperantista kaj la Flandroj.

Unu el niaj kunlaborantoj skribas :

„ Okaze de la nunjara kongreso de Belga Ligo Esperantista en la flandra urbo Gent, dum Pentekosto, la kongresanoj estis akceptataj de la urbestro.

Tiu akcepto okazis ekskluzive francelingve, flanke de la magistrato, flanke de Belga Ligo.

Eble B. L. E. decidis estonte nur okupiĝi pri la valona parto de la lando lasante al ni la zorgon grupigi la flandrajn samideanojn ”.

Ni presigas la amarajn vortojn de nia samideano sen aldoni kaj sen forigi ion.

Por ni ne estas mirindaĵo. Dum la kongreso en la flandra Bruĝo okazis la samo : ĉio kio estis ne-esperanta, estis **nur franca.**


La Flandroj jam ricevis pli ol unu vangfrapon de la B. L. E. : ili fine lernu el ĉio tio, ke ilia loko tute ne estas en tiu Ligo.

Leterkesto.

Al niaj Katalunaj amikoj. - Kiam reviviĝos „Kataluna Esperantisto” ? Kiam reviviĝos la „Kataluna Esperantista Federacio” ?

Ger. De Boes, Ronse. — Dankon pro mondonaco ! Nia revuo aperos **REGULE** ĉiumonate (dekdu kajeroj ĉiujare). Ne forgesu promesitan artikolon ; se eble aldonu kliŝojn. Kuraĝe ni ekmarŝas kaj nenion povas nin haltigi.

For la milito ! — For la fratmortigo ! — Neniam plu milito !



Esperantistoj ! Kontraŭbatalu la militon, la plagon de l'homaro, kiu forfalĉas tiom da junaj, multonpromesintaj vivoj !

Neniam forgesu, ke la Majstro antaŭ ĉio volis atingi per Esperanto harmonion kaj pacon inter la popoloj !

VLAMINGEN, LEERT

ESPERANTO

DE MODERNE WERELDTAAL.

De Wereldhulptaal Esperanto

verbreidt zich over heel de aarde en heeft aanhangers in alle steden der wereld.

Dientengevolge staat in ieder opzicht voor den Esperantist **de geheele wereld open.**

Geen ontwikkeld persoon, die met zijn tijd meeleeft, verzuime dan ook het Esperanto te leeren.

Esperanto zij de tweede taal voor allen.

Het einddoel is dus, dat tegenover landgenooten steeds de moedertaal, en tegenover vreemdelingen, van welke natie ook, steeds Esperanto gebruikt wordt. Dat brengt de eenvoudige, maar ideale oplossing van het vraagstuk der internationale taalverwarring, door welk euvel vrede en welvaart, handel en verkeer, enz., zoo ernstig worden belemmerd. Hopenlijk is echter de tijd niet meer verre, dat men zich za afvragen: **Hoe heeft de moderne wereld het zoolang zonder een gemeenschappelijke hulptaal kunnen stellen?**

Intusschen hebben de Esperantisten door onderlinge organisatie reeds voor zich alle taalmoeilijkheden uit den weg geruimd. De Esperantist correspondeert lustig in één taal met de geheele wereld. Ieder land heeft z'n Esperanto-vereenigingen en Esperanto-bladen. Vele groote uitgevers leggen zich toe op Esperanto uitgaven. Er bestaan reeds ± 7000 verschillende Esperanto boekwerken. De firma Mosse te Berlijn heeft een internationale Esperanto bibliotheek gesticht, waarvan wekelijks een boekje verschijnt. Vrijwel alle radiostations zenden uit in Esperanto, of gaven Esperanto cursussen. De Volkenbond heeft Esperanto aanbevolen en verklaard dat het 8 maal gemakkelijker te leeren is dan welke taal ook. De telegraafunie heeft Esperanto erkend als internationale telegraaftaal. Het internationaal Arb. Secretariaat (instelling van den Volkenbond) geeft al z'n mededeelingen uit in Esperanto. Door vele internationale organisaties en op de congressen wordt Esperanto toegepast, enz. enz.

Esperanto is zeer welluidend, (klinkt ongeveer als Italiaansch) er is door logische bouw en samenstelling, gemakkelijk te leeren, zoodat vooral voor hen, die reeds meer aan talenstudie gedaan hebben, Esperantostudie eigenlijk een ontspanning is.

Laat ons dadelijk eens wat nader met Esperanto kennis maken.

Uittreksel uit de Esperanto grammatica en uit de eerste les.

De uitspraak is zeer eenvoudig en grootendeels gelijk aan 't Nederlandsch.

Er zijn slechts vijf klinkers: **a-e-i-o-u**, die respectievelijk ongeveer klinken als onze klinkers in: **ar-er-zien-por-koe**.

g klinkt als onze g, doch **ĝ** klinkt als **dzj**: **ĝardeno** — uitspraak = **dzjar-de-no**. (= tuin).

s klinkt als onze s, doch **ŝ** (dus met kapje) klinkt als **sj**: **maŝino** (uitspr. **masjino**) = machine.

De **klemtoon** valt steeds op de **voorlaatste** lettergreep: **somero** = zomer, **paroli** = spreken, **rivero** = rivier, enz.

De **lidwoorden** (de en het) zijn steeds **la**: **la urbo** = de stad, **la infano** = het kind, **la homoj** = de menschen, enz.

Het lidwoord **een** ('n) wordt in Esperanto niet vertaald.

Alle **zelfstandige naamwoorden** eindigen op **o**: **parko** = park, **sezono** = jaargetij, **natur** = natuur, **strato** = straat, **industrio** = industrie, enz.

Alle **bijvoeglijke naamwoorden** eindigen op **a**: **larĝa** = breed, **bela** = schoon, **multa** = veel, enz.

Het **meervoud** wordt steeds gevormd door **j**: **Romano** = Romein, **Romanoj** = Romeinen, **tempo** = tijd, **tempoj** = tijden, enz.

De **persoonlijke voornaamwoorden** zijn: **ik** = mi, **gij** = vi, **hij** = li, **zij** = ŝi, **het** = ĝi, **wij** = ni, **zij** = ili, **men** = oni.

Het **onveranderde werkwoord** (onbep. wijs) gaat steeds uit op **i**: **loĝi** = wonen, **kuŝi** = liggen, **esti** = zijn, **sidi** = zitten, **ekzisti** = bestaan, **viziti** = bezoeken, **havi** = hebben, enz.

De **tegenwoordige tijd** eindigt voor alle personen op **as**: **ik wandel** = mi promenas, **hij is** = li estas, **wij bestaan** = ni ekzistas, enz.

De **verleden tijd** eindigt voor alle personen op **is**: **wij wandelden** = ni promenis, **mi estis** = ik was, enz.

De **toekomstige tijd** eindigt voor alle personen op **os**: **mi promenos** = ik zal wandelen, **mi kantos** = ik zal zingen, enz.

Telwoorden zijn: **0** = nulo, **1** = unu, **2** = du, **3** = tri, **4** = kvar, **5** = kvin, **6** = ses, **7** = sep, **8** = ok, **9** = naŭ, **10** = dek, **11** = dek unu, **12** = dekdu, **20** = dudek, **100** = cent, **1000** = mil, **1.000.000** = miliono, **1929** = mil naŭcent dudek naŭ.

Alle regels zijn zonder uitzonderingen!

De woordvorming.

Esperanto heeft slechts een paar duizend stamwoorden, die gemakkelijk geleerd kunnen worden, omdat het meest internationale of bekende

woorden zijn. Toch is Esperanto even rijk aan woorden als welke taal ook. Dit heeft Dr Zamenhof, de ontwerper, bereikt door een vernuftig stelsel van voor- en achtervoegsels. In alle talen bestaan die ook wel, b.v. het achtervoegsel „in” dat in 't Nederlandsch (en ook in 't Duitsch) van mannelijke woorden, vrouwelijke maakt: boer-boerin, vriend-vriendin, enz.

In Esperanto worden deze voor- en achtervoegsels echter onbeperkt doorgevoerd en we krijgen dus:

Reĝo = koning, reĝino = koningin, viro = man, virino = vrouw, knabo = knaap, knabino = meisje, onklo = oom, onklino = tante, amiko = vriend, amikino = vriendin, enz. enz.

(Esperanto kent alleen een natuurlijk geslacht, dus alleen bij menschen en dieren; al het andere is onzijdig).

Het voorvoegsel mal vormt tegenstellingen: juna = jong, maljuna = oud, granda = groot, malgranda = klein, varma = warm, malvarma = koud, nova = nieuw, malnova = oud, enz.

Hier volgen nog enkele achtervoegsels:

Isto duidt een beroep aan: maŝino = machine, maŝinisto = machinist, kanti = zingen, kantisto = zanger, labori = werken, laboristo = arbeider, enz.

Aro geeft een verzameling te kennen: arbo = boom, arbaro = bosch, homo = mensch, homaro = menschdom, enz.

Et beteekent verkleining: monto = berg, monteto = heuvel, domo = huis, dometo = huisje, enz.

Ano is lid of aanhanger: klubo = club, klubano = clubgenoot, lando = land, landano = landgenoot, enz.

Ejo is plaats: lerni = leeren, lernejo = school, laborejo = werkplaats, enz.

Estro is baas: laborestro = werkmeester, lernejestro = schoolhoofd, enz.

Inda beteekent waardig: legi = lezen, leginda = lezenswaardig, vidi = zien, vidinda = zienswaardig, enz.

Ebla geeft mogelijkheid te kennen: trinki = drinken, trinkebla = drinkbaar, videbla zichtbaar, enz.

Zoo heeft Esperanto nog eenige voor- en achtervoegsels en grammaticale bestanddeelen, doch alle zijn even logisch als eenvoudig, zoodat de studie, vooral voor eenigszins ontwikkelden, een bron van genoeg is.

Onthoud nu nog de beteekenis der volgende woordjes, dan kunt u reeds onderstaande oefening lezen:

dum = gedurende, ne = niet, apud = dichtbij, en = in, do = dus, jam = al, kaj = en, meze = te midden, ankaŭ = ook, floranta = bloeiende, universitato = universiteit, eĉ = zelfs, sur = op, de = van.

FLANDRUJO (= Vlaanderen).

Flandrujo estas bela lando. Ĝi kuŝas apud la Norda maro. En ĝi loĝas kvar milionoj da homoj. Dum la somero, la varma sezono, multaj turistoj vizitas Flandrujon. En Flandrujo estas floranta industrio kaj komerco. La Flandroj estas la sola popolo en la mondo, kiu ne jam havas propran universitaton. La Flandroj, subpremitaj en Belgujo, postulas memregecon.

Het ontstaan van Esperanto.

Dr Zamenhof, een Pool, heeft Esperanto samengesteld uit de meest geschikte bestanddeelen der bestaande talen. Zoo verkreeg hij een geheel, dat door de Academie van Wetenschappen te Parijs een „Meesterwerk van Logica en Eenvoud” genoemd werd.

Het aantal talen dat over de geheele wereld gesproken wordt bedraagt ± 2000. Zamenhof, de menschevriend, was ervan overtuigd, dat dit evenzoo veel struikelblokken zijn, die internationale toenadering in den weg staan. Daarom besteedde hij zijn geheele leven aan zijn ideaal: de Wereldhulptaal. Nochtans staat Esperanto niet tegenover de nationale talen, integendeel, het beschermt de moedertaal, vooral van kleine naties tegen onderdrukking en vernedering. Esperanto wil uitsluitend gebruikt worden voor internationale doeleinden.

Esperanto is dus de taal van den vrede. De Meester is in 1917, te midden van het grootste oorlogsgeweld, te Warschau overleden. Zijn taal echter verbreidt zich onweerstaanbaar over de wereld.

Groote geleerden, als Prof. Casimir, en taalkundigen als Dr Geyl, Royen e. a. verklaren thans dat,

„Esperanto een dringende eisch van den tegenwoordigen tijd” is!

Om in een dringende behoefte te voorzien en om alle Vlamingen gelegenheid te geven Esperanto volledig te leeren, richt

FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA

kursussen in, dewelke worden gegeven, naar vereischte, in het Algemeen Vlaamsch Huis „Malpertuus”, Frankrijklei, 8, Antwerpen, iederen Woensdag van 7 tot 8, en van 8 tot 9 uur 's avonds. Deze lessen worden gegeven door uitstekende esperantisten en bestaan uit 12 à 15 lessen. Een nieuwe reeks lessen vangt telkens aan bij voldoende aantal inschrijvingen.

De inschrijving is steeds geopend. Wij verzoeken vroegtijdige aanmelding om alles tijdig te kunnen regelen. Indien gij dus wilt deelnemen, meld U dan liefst dadelijk aan. Aanmelding geschiedt aan het Secretariaat, bovenvermeld adres.

De Vlamingen, niet te Antwerpen of in de omgeving verblijvende, die verlangen Esperanto te leeren, gelieven zich met ons in verbinding te stellen: wij zullen hun de noodige leerboeken verschaffen en het noodige doen om hun de studie te vergemakkelijken.

Vlamingen, leert Esperanto! Leert dit wapen hanteeren tegen de Brusselsche centralistische regeerders, die niets meer vreezen dan de bekendmaking van de verzuchtingen der Vlamingen in het Buitenland!

Vlaamsche Esperantisten, gij die reeds het Esperanto machtig zijt, uwe plaats is in onze rangen. Sluit U aan bij

Flandrema Grupo Esperantista

Algemeen Vlaamsch Huis „Malpertuus”

Frankrijklei, 8 — Antwerpen.

INTER NI.

FLANDREMA GRUPO ESPERANTISTA, ANTVERPENO.

Dank' al la klopodoj de nia Ward kaj lia fidela Steven la Flandrema Grupo reviviĝis: la malnovaj membroj revenis, novaj aliĝis, kaj nun ni estas pli ol 100-ope!

Tri kursoj, gvidataj de s-roj Vermuyten kaj van Schoor, kun pli ol 80 gelernantoj, malfermiĝis en nia sidejo „Malpertuus”, Frankrijklei, 8. Malgraŭ la periodo de la balotelektoj, dum kiuj ĉiuj flandremuloj havas tiom malmulte da libera tempo, la kursoj estis regule ĉeestataj, kaj certe ili liveros post kelkaj semajnoj novan kontingenton da freŝaj esperantistoj, kiuj volas servi Flandrujon kaj la homaron per Esperanto.

Estis nia grupo kiu instigis al eldonado de propra revuo, al starigo de propra Esperanto-Instituto por la Flandroj kaj kiu ne ripozos antaŭ kiam Flandrujo estos inde reprezentata en ĉiuj esperantistaj internaciaj organizaĵoj.

El ĉiuj anguloj de la lando ni ricevis entuziasmajn aprobojn kaj baldaŭ ni havos samcelanojn en ĉiu urbo, en ĉiu vilaĝo de Flandrujo!

Flandraj esperantistoj, la Antverpenaj samideanoj, montris al vi la vojon!

MART.

LA FLANDRA POPOLO.

de Hugo Verriest.

Iam ekzistis popolo, nobla kaj granda, konata en la tuta mondo. Antaŭ kvin- ses cent jaroj vi ne povis trovi sub la suno iun regionon, kie oni ne konis, ŝatis kaj laŭdis la Flandron.

Multaj, eĉ en Eŭropo, ne plu scias, ke ekzistas ankoraŭ Flandroj.

Unu el miaj plej bonaj amikoj iam estis en Vieno. en Aŭstrujo, kaj restadis tie dum kelkaj monatoj. Interkonatiĝinte kun Germanoj, kiuj estis iĝintaj amikoj kaj kiuj konsideris lin kiel Belgo, li iam diris, ke li estas Flandro. „Flandro”, oni respondis al li, „Flandro, tio tamen ne povas esti de tiu malnova Flandra popolo, kun ĝia vasta komerco, kun ĝia arto, kun ĝiaj potencaj armeoj, kiuj batalis kun la Aŭstroj kontraŭ la Franca invado. Tiu popolo depost longe estas morta”. Sed kiam ili aŭdis, ke li vere estis Flandro de malnova raso kaj malnova tradicio, ho! tiam li ĉielalte leviĝis en ilia penso. Belgujon ili ja konis, tiun malgrandan landon kuŝantan inter Francujo kaj Germanujo; sed Flandrujo, la malnova Flandrujo, kun tuta ĝia estinto, ho! tio estis mondgranda.

Nu, tiu granda, tiu nobla popolo ree devas aperi sub la suno, vivi, moviĝi, paroli, labori, unuvorte: ekzisti. Ne alia popolo, ne nova popolo, tiu popolo.

Tiu popolo havis liberecon, kiam tuta Eŭropo estis ankoraŭ en ia sklaveco kaj sentis la devon sur siaj ŝultroj kaj en sia koro: nur la Flandra popolo povis paroli pri rajtoj, povis rigardi siajn princojn kaj sinjorojn libere en la okulojn, kaj diri: „Ni volas”.

Ĉu vi vizitis Bruĝon kaj ĝian belan halturon? Kvardekŝtupare alte estas salono, malsuper kaj super ŝtona arkaĵo, malantaŭ muroj dikaj je tri futoj. En tiuj muroj estas farita profundaĵo kun du pezaj, feraj kradopordoj. Malantaŭ tiuj kadraĵoj kuŝas netuŝeblaj, pezaj, kverkaj kestoj, tute kovritaj kaj surforĝitaj per fero. Ŝlosilaron oni bezonas por malfermi kaj ĉiu ŝlosilo estas malsama. La estraro havis ŝlosilon, la urbestro kaj la dekanoj de la gildoj: ĉiuj devis ĉeesti por malfermi la kestojn. En tiuj kuŝis la aktoj kaj privilegioj, kaj se unu el ili estus kuraĝinta perfortan malfermon, ho tiam la avertsonorilo kantis sian kanton, la standardoj ekflirtis, la trumpetoj klarionis, la tamburoj estis frapataj kaj la armiloj sonis tra la stratoj sur la libera placo. Vi konas la historion de Karlo la Malsaĝa en Gento, de la „Witte Kaproenen” (*) de la potencaj gildoj kaj de la libera parolmaniero de tiu libera popolo: de Coninck kaj Breidel, Zannekin, Artevelde, Yoens, van den Bossche, Ackerman kaj cent aliaj. — Ĉe la Grekoj, diras unu el niaj verkistoj, ili estus estintaj dioj, en Flandrujo estis burĝoj.

(*) Ribelantoj el la XVa. jarcento, kiuj portis blankajn ĉapojn. — Noto de la tradukinto.

Tiu popolo havis potencon. La nacia historio estas kiel mirinda libro. Tiu malgranda granda Flandrujo staras kontraŭ potencaj reĝolandoj kaj imperioj, kun la glavo en la pugno kaj la ora mantelo sur la ŝultroj. Ĝi fleksiĝas kaj malantaŭeniras pro neniuj. Filipo la Bela spertis ĝin apud Kortrijk kaj apud Rijsel, kaj Ludoviko de Male, kaj ĉiuj reĝoj kaj grafoj, kiuj iam regis super Flandrujo. La historio de Anglujo, Aŭstrujo, Francujo, Hispanujo portas la Flandran nomon sur ĉiu folio. Portugalujo dankas sian ekzistadon al kelkaj centoj da Flandroj. Parolu krom tio pri tiuj geantaj kvereloj inter la Flandraj urboj! Dudek aliaj nacioj kaj popoloj estus ruiniĝintaj kaj pereintaj sub tia perforto, tia disputado kaj divido. Sed Flandrujo staris forta kiel roko! — Flandrujo kontraŭstaris ĉiujn ŝtormojn, sed ĝi iom post iom estis subfosita kaj nun, ĝin minacas ruiniĝo kaj malapero.

Tiu popolo havis industrion kaj mondkomercon. Vi ĉiuj konas ĝiajn liberajn foirojn kaj ĝiajn popol- kaj trezorriĉajn urbojn. Hodiaŭ ili ankoraŭ sufiĉe laŭte parolas pri estinta prospero. Trakuru Bruĝon kun ĝiaj haloj, landdomoj, gildodomoj kaj foirejoj. Rememoru nur kiom miloj da ŝipoj enveturis dum unu jaro, ĝis sub la nun detruita Akvohalo de la Granda Placo, kie ili ŝarĝis kaj malsarĝis ŝirmitaj kontraŭ la pluvo. — Ha! kiaj homoj por loĝi en tiuj palacoj! Oriento kaj Okcidento, Sudo kaj Nordo kunvenis en Flandrujo por interŝanĝi nenombreblajn trezorojn!

Tiu popolo havis artojn. Ankoraŭ nun ĝiaj du pentroskoloj estas konataj en la tuta mondo kaj la oro ruliĝas sur iliaj pentraĵoj. Rigardu ĝiajn urbodomojn, ĝiajn halojn, ĝiajn monakejojn kaj belegajn preĝejojn: kaj la kanto de van Maerlant ne jam estas forgesita.

Tiu popolo havis lingvon, esprimon de propra ekzistado, pensado kaj sento. Ĝi parolis kaj skribis propralingve al reĝoj kaj princoj. Ĝi traktis siajn proprajn aferojn per propra lango, skribis proprajn leĝojn per propra lingvo; juĝis, direktis, parolis, preĝis, unuvorte: vivis Flandre.

Tiu popolo havis religion. Rigardu tiun malnovan Flandran popolon! Ĉie en ĝiaj verkoj vi trovas la markon de ĝia kristana kredo. — Klopodu por imagi la malnovan veran Flandron sen lia religio kaj kristaneco. Ne; vi ne kapablas tion! Vi, nek neniuj! Tiu sento kuŝas en lia pensado kaj en lia koro, en lia laboro kaj en lia parolo; jes, en lia parolo; kaj la parolata lingvo, kiu estas restinta netuŝita en Flandrujo, estas plena je tio. — Liaj kutimoj, la malnovaj Flandraj kutimoj, ne parolas pri io alia. Iru ja en domon en la kamparo, kie la Franca neniam estas preterblovinta, kaj vidu kion tie faras gepatroj kaj infanoj, estroj kaj laboristoj de frumatene ĝis malfruvespere, de l'aŭtuno

ĝis la rikolto, kaj vi konos la kristanan brilon de l'malnova Flandrujo. La historio sufiĉe laŭte rakontas por ili, kiuj ne estas surdaj.

Tiu popolo havis propran staturon, sintenadon, penson, karakteron kaj edukon. Flandro estis Flandro. Nuntempe ankoraŭ Franco estas Franco. Anglo estas Anglo, Germano estas Germano; sed Flandro, kio estas Flandro? Kie estas ĝia propra penso pri propreco, pri valoro, pri beleco, pri lando kaj lingvo? Kio estas laŭdata en Francujo estas laŭdata en Flandrujo; kaj kio estas honorata tie, estas tia ankaŭ tie ĉi. Kaj se Franca malsaĝulo ridas kaj mokas pri la saĝa kaj estiminda viro, ĉar ties vesto estas tro mallonga aŭ tro longa, tro mallarĝa aŭ tro larĝa, la Flandro nun povas tion ankaŭ.

Kie estas la Flandra sincereco, nekaŝemo, dececo kaj kuraĝo? Kie estas lia fiera sintenado kaj nobla fiereco? Ho! diris Karlo la Malsaĝa, vi, viroj el Flandrujo, havas obstinajn kapojn kaj fieran lingvajon, sed tion mi ja mallernos al vi... Sed neniam li kapablis tion.

Iam ekzistis popolo, kiu estis de supre ĝis malsupre unuigita kaj Flandra. **Tiun popolon ni devas revivigi.**

Tradukis POL VAERENS.

DIVERSAĴOJ.

Niaj bretonaj samideanoj havas propran organon „Nord-Okcidento”, kiu aperas samtempe kun la bretonlingva kvaronjara revuo **Gwalarn**. Ĉiujn korespondaĵojn oni sendu al: Gwalarn, B. P. 75, Brest (Bretonujo).

* * *

„FLANDRA ESPERANTISTO” DEZIRAS INTERŜANĜI
KUN ALIAJ ESPERANTAJ REVUOJ.

* * *

Al niaj kunlaborantoj.

Al la grupaj sekretarioj.

La manuskriptoj devas atingi nin nepre antaŭ la 15a. por presigo en la sekvonta numero.

BIBLIOGRAFIO.

(Ni recenzas duope senditajn verkojn, unuopajn ni citas.
Ĉiu verko estas havebla ĉe „Flandra Esperanto-Instituto”)

Amo kaj Poezio

de JAN VAN SCHOOR.

Amo al poezio kaj poezio en la amo, jen la verko de Jan Van Schoor, nia flandra trobadoro, kiu honeste per delikataj, simplaj versoj partoprenas en la internacia esperanta koncerto.

En la sonriĉa muziko de nia lingvo, Van Schoor tuj trovis la rektan esprimilon de sia impresema naturo kaj dum kelkaj jaroj ni dise ĝuis en revuoj la ĉarmajn poeziaĵojn, kiuj parte estas kunigitaj en la libro, sed vestitaj nun en tre alloga vesto.

La Muzo de Van Schoor ne estas bruema sed per dolĉaj paŝoj ŝi iras tra la floriĉa lando de la intima animvivo, kun simpla parolo en la buŝo, preskaŭ ĉiam resonigante la romantikan kordon en nia koro, kiu ja neniam ekrompas en ni, eĉ kiam nia vivsperto ĝin ŝajne malagordigas.

Kiel Van Schoor iras tra la vivo tiel iras lia Muzo, vivĝoje, sentame, sed ĉiam sentante la misteron ĉirkaŭ si, kondukante de vivo al amo, de amo al morto.

Pasiaj, feliĉaj, plendaj kaj melankoliaj tonoj, milda rido, kelkfoje amara ekaŭdiĝas el la poemetoj. Ni perceptas varman koron kaj seniluziigan larmon kaj en la fundo de la suprenleviĝanta fantazio, la memiro-nian, memkomprenan realon.

Ni tre rekomendas la legadon de „Amo kaj Poezio” al tiuj Esperantistoj, kiuj preferas la simplan, rektan esprimon de sanaj imagoj al tro rafinitaj sentoj kaj mallumaj bildoj.

Jan Van Schoor havas honorindan lokon inter niaj bonaj lirikistoj.
H. VERMUYTEN.

Subteno por nia revuo.

Apotekisto De Praeter, 100,— fr. ; *provincestrarano Arseen Kennes*, 20,— fr. ; *Gustaaf Janssens*, 20,— fr. ; *monkolekto de Mart en la „Sankta Dometo.”*, post kantado de Beer Peeters, 55,40 fr. ; *Ger. De Boes, Ronse*, 100,— fr. ; *monkolekto de Mart en la „Flandra nacionalista Junularo”* post kantado de nia blinda samideano Fiten, 50,— fr. ;
entute : 345,40 fr.

Flandra Esperanto Instituto

Gravinstraat, 32

BORGERHOUT-ANTWERPEN

Postčekkonto 2427.03

Presado - Eldonado - Librovendado

Propagando - Instruado.

Petu niajn prezojn !

ESPERANTISTEN !
BLINDENVRIENDEN !

ABONNEERT U

op het maandblad van het

Algemeen Blindenverbond
van Vlaanderen

29, Rijselsche baan, Antwerpen-West
Jaarlijksche bijdrage : 10, 30 of 100 frank.
Postcheck 195.224.

Helpt daadwerkelijk de
Vlaamsche blinden.

BELANGRIJKE MEDEDEELING

voor hen die Esperanto thuis studeeren willen.

Voor diegenen, die de lessen ingericht door *Flandrema Grupo Esperantista* niet volgen kunnen, maar geneigd zijn Esperanto thuis te studeeren, zal „FLANDRA ESPERANTISTO”, het maandelijksch orgaan der Vlaamsche Esperanto-beweging, van af zijn 2^e nummer een cursus afkondigen in 10 lessen, vooral geschikt voor zelfstudie.

In het volgende nummer zullen steeds de gemaakte oefeningen van het vorige nummer verschijnen, zoodat de studeerenden hunne gemaakte oefeningen er mede vergelijken kunnen.

Diegene, die dus Esperanto thuis studeeren wil, abonneere zich dadelijk op

Flandra Esperantisto

Monata Revuo - Organo de la Flandra Esperanto-Movado

Prijs van het abonnement : 10 FRANK, dewelke men gelieve te storten op POST-CHECK NR 1735.09.

Algemeen Vlaamsch Huis „MALPERTUUS”

S. POT - HANSEN

Frankrijklei, 8 - Antwerpen.

Bekend voor zijn extra dranken
o. m. Dortmunder, Spatenbräu,
Leeuwenbier.

Goed koud buffet Goede bediening.

Kunvenejo de l'Esperantistoj.

HUIS DE LEY

Driekoningenstraat. 43, Berchem.

De Ley & Verschueren

CITÉ

N^{rs} 143-144-145-146-147-179-180-
208-209

Groote keus in Vrouw- Manstoffen
Zijde, Fluweel en Voeding.